

La Brita Esperantisto

Marto-Aprilo 1985



Sur duoninsulo arbara inter Harlech kaj Porthmadog en Norda Kimrujo troviĝas la italeska vilaĝo Portmeirion.

La

Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST

ELDONAJO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

81/A Jaro, N-Ro 863

Marto-Aprilo 1985

Eldonas:

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF. Tel. 01-727-7821

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK 14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

La jara kotizo por EAB – aliĝu en iu ajn monato – estas £10.00 (£6.00 se malpli ol dek-ok-jara). Anoj ricevas la du gazetojn 'Esperanto News' kaj 'La Brita Esperantisto'. Abono nur al "La Brita Esperantisto" estas £5.00 jare sen aneco.

Perpoŝtaj korespondaj kursoj estas haveblaj en stadioj I, II, 'intensive' kaj Altgrada, ankaŭ ekzamenoj. Petu detalojn kaj prezojn ĉe Esperanto Centre, 140 Holland Park Ave., London W11 4UF – kun afrankita mezgranda koverto.

Form of Bequest

I give and bequeath (free of duty) to Esperanto-Asocio de Britujo whose present address is 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF, the sum of £..... to be used for the general purposes of such Association. And I direct that the receipt of the Secretary for the time being of the Association shall be a sufficient discharge to my Trustees for such a legacy.

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

Raporto de la Administra Komitato por la periodo 1-a de Novembro, 1983 ĝis la 31-a de Oktobro, 1984 prezentota al la anoj okaze de la jarkunveno en Canolfan Aberconwy Centre, Llandudno je la 7-a de Aprilo, 1985 je la horo 10.30-a.

STATISTIKO: Denove, post jaro de grandaj laboroj, sukcesa publiko kaj konstanta enfluo de informpetoj, la aliĝoj de tute novaj anoj restis proksimume la samaj kiel kutime – 199. El la restantaj anoj en BEA 9 finfine transiris al EAB. Sed la perdo de anoj restas alta, tro alta, kaj do la fina rezulto ne montras kontentigan gajnon. Grava problemo estas la perdo de unu/du-jaraj anoj.

Anoj	1082	(1057)
Junuloj (malpli ol.....	19	(33)
18-jaraj)		
	_____	_____
	1101	(1090)

FINANCO: Financa raporto aperos kune kun la reviziitaj kontoj.

AFEROJ DE LA ASOCIO: La Komitato kunsidis sesfoje dum la dek du monatoj, unu el kiuj estis en Weston-super-Mare kaj unu en Swanwick okaze de la TEJO-Kongreso. La Konsila Komisiono kunsidis kvarfoje.

BRITA KONGRESO: Por la dua fojo dum la pasintaj du jardekoj la kongreso okazis en Weston-super-Mare ĉe la Winter Gardens kaj ĉiuj konsentis, ke ĝi estis tre kontentiga kongreso, en ĉeesto de proks. 300 anoj. Krom la kutimaj eroj, oficiala akcepto de loka instanco, jarkunvenoj de BEA, EAB, ETA, JEB kaj aliaj; fakkunvenoj, prelegoj elstaraj, diservo, koncertoj, balo, ekskursoj, konversaciaj rondoj, estis aliaj elstaraj. La fama BBC-Iaj Demandoj (Any Questions) okazis en la balĉambro vendredvespere kun unu demando pri

Esperanto; estis prezento de 'Proceso per Ĵurio' en Esperanto-traduko dum la dimanĉvespera koncerto, kaj solvoĉa teatraĵo pri Zamenhof en prezento de Pola gastino Jadwiga Gibczynska. Speciala okazaĵo elstara, ne en la kadro de la kongreso sed samtempe, estis BBC-2 televida prezento de "High Hopes" je la dimanĉa vespero kiu temis pri Esperanto. Video-filmo poste montrigis en la kongresejo.

SKOTA KONGRESO: La 79-a Kongreso de la Skota Esperanto-Federacio okazis je la 13/15-a de Aprilo en Crieff. Novelektita prezidanto estas Prof. Stanley Nisbet, verkisto de la nova informlibro de EAB "Esperanto's Time Has Come".

KORESPONDAJ KURSOJ:

Stadio porkomencanta	44	(52)
intensiva	35	(55)
Stadio 2 mezgrada	22	(22)
Stadio 3 altgrada	17	(22)

Aldone al la sennombraj partoprenantoj de la senpaga 12-leciana kurso, kiu iomete konkuras kun la aliaj porkomencantaj – kaj iomete helpas al la mezgrada? (La ciferoj por 1983 estis pli altaj ol kutime).

EKZAMENOJ:

Stadio 1	29	(35)
Stadio 2	18	(13)
Stadio 3	16	(5)
Diplomoj gajnitaj	4	(3)

Sajne, kelkaj reagis al la konsiloj en la pasinta raporto kaj provis ekzamenon, sed restas multaj aliaj, kiuj vere devus celi al la diplomo?

GRUPOJ KAJ FEDERACIOJ: La *Orienta Federacio* perdis pro morto, dum la somero, sian multjaran sekretariinon Lily Palmer, kiu multon faris por la Movado dum la jaroj. Konferencoj okazis en Ilford, Ipswich, Shenfield kaj Bury St. Edmunds kun kutima ĉeestantaro 35/45. Estas grupoj en Ilford, Havering, Southend, Chelmsford, Ipswich,

Bury St. Edmunds, Haverhill kaj Felixstowe. Somera pikniko en Clare, Suffolk en Junio allogis 25 anojn. Ron Bourton, lernejestro en Kersey, Suffolk ekskursis al Brugge, Belgio kun 11 geinfanoj laŭ aranĝo de la Belga Esperanto-klubo. La grupoj Ilford/Havering kaj Felixstowe invitis kaj ĝuis prezentojn de la Pola aktorino Jadwiga Ĝibczynska, helpe de F-ino Strapps.

La *Suda Federacio* organizis tre sukcesan interfederacian semajnfino de Wickham apud Southampton. Entute partoprenis 46 Esperantistoj. La plej aktiva grupo estas tiu en *Southampton*, kiu havis tre sukcesan jaron. La ĉiusemajna ĉeestantaro preskaŭ duobligiĝis en dek du monatoj kaj nun kunvenas inter 18 kaj 28 ĉiunmerkredoj. La grupo organizis tuttagan seminarion en la printempo kaj partoprenis en la distrikta foiro en julio dum tri tagoj. Por akiri monon oni aranĝis sukcesan balon en februaro kaj partoprenis en diversaj lokaj aranĝoj dum la jaro. Estis vizitantoj el Nederlando, Danlando, Japanio, Kanado kaj Sardinio. Alia aktiva grupo estas en *Reading* kiu kunvenas ĉiunonate, kutime en la domoj de anoj. Vizitantoj dum la jaro estis el Hindujo, Pollando kaj 20 junaj biciklantoj el Eŭropo kiu haltis survoje al la TEJO-Kongreso en Swanwick. Inter la kunvenoj estis ĝardenfesto, muzika vespero, promeno kaj prelego pri lingvolernado. Ankaŭ estas grupo en *Bournemouth* kun monataj kunvenoj inkluzive de promenoj. En septembro estis ekspozicioj en biblioteko kaj la urbdomo, kaj en novembro en bankfenestro. S-ro A. H. Middlemast, post 25-jara fidela servado kiel sekretario, ekŝiĝis.

La *Orient-Mezlanda Federacio* kunvenis en printempo kune kun la jarkunveno de SATEB ĉe Swanwick, aranĝis komunan viziton al Wollaton Hall en Aprilo kaj ĝardenfeston ĉe Chellaston en Junio. La klubo *Nottingham kaj Distrikto* daŭre funkcias kun kunvenoj dufoje monate, kelkaj kiel eksteraj vizitoj kaj unu por festi la "oran" datrevenon

de la geedziĝo de la sekretario kaj edzino, Ges-roj H. Fillingham. Kelkaj anoj deĵoras en la L.K.K. por la Brita Kongreso en 1986 en Loughborough. La klubo estas en daŭra kontakto kun la loka lingvista klubo kaj provizas parolantojn al aliaj lokaj kluboj diversaj.

En *Devon kaj Cornwall* estas klubo en *Plymouth* kies anoj estas tre vojaĝemaj. Inter la lokoj vizititaj estas Barcelona, Vankuvero, Sud-Afriko kaj Francujo; kaj Ges-roj Griffiths gastigis kelkajn alilandulojn. Per hospitala radio kaj loka "Radio-Cornwall" tri anoj alparolis la publikon pri Esperanto. La grupo en *Exeter* daŭre kunvenas en la universitato. En aliaj urboj individuaj samideanoj aktivatas.

Anoj de la *Sud-Mezlanda Federacio* kunvenis en Letchworth en februaro por aŭskulti al D-ro V. P. Ranganayakulu pri Hindujo, en Watford en Junio por vidi la prezenton de Pola aktorino, Jadwiga Ĝibczynska pri Marie Curie kaj en lernejo en Northampton en novembro por aŭdi pri lernado de lingvoj en lernejoj kaj sperti la lingvan laboratorion tie. Ĉiuj kunvenoj havis aferkunsidon kaj grupon por komencantoj. For de la centro de la federacia regiono estas grupo en *Oxford* sub gvidado de D-rino Marjorie Boulton. Spite de la kulturaj allogaĵoj de Oxford, la Esperanto-grupo daŭre laboras por akiri novajn anojn kun iom da sukceso. Ĝi aranĝis propran studentan perŝtatan kurson, du semajnfinajn kursojn kaj budon ĉe "Freshers' Fair". (Okazaĵo por novaj universitataj studentoj).

En *Jorkŝiro kaj Humberside* grava afero ĉiujare estas la unutaga seminario en Bradford, kiu kutime allogas 45 gestudentojn. Novaj grupoj en Harrogate kaj Scunthorpe daŭre kunvenas, kaj aliaj grupoj estas en Bridlington, Grimsby, Halifax, Huddersfield, Keighley kaj Sheffield. Bruno Najbaro gvidas kurson en teknika lernejo en Keighley kaj Bill Darlison en vespera lernejo en Horsforth. Lokaj ĵurnaloj kaj radio-

stacioj estas daŭre informitaj pri la seminario kaj aliaj lokaj aktivoj. En *Bradford* estas tre vigla grupo kiu kunvenas dufoje monate en publika biblioteko kun tre interesa presita programo. Voĉ-korespondado pere de kasedoj estas daŭra afero kun amikoj en Brazilo, Svedujo, Francujo kaj Kanado. Klubanoj persone renkontis kelkajn el la korespondantoj ĉe la U.K. en Vankuvero.

La ĉefa afero en la *Okcidenta Federacio* dum la 1984 estis la tre sukcesa organizo de la Brita Kongreso en Weston-super-Mare, sub gvidado de Philip Willey, multjara sekr. de la Federacio kiu, post eksigo el tiu ofico en la somero, turnis sian energion al starigo de loka grupo en *Woodspring*. Grupoj ankaŭ aktivas en Cheltenham kaj Bristol kie oni aranĝis unu-tagan kunvenon por komencantoj. Oni daŭre faras publicon pere de budoj en lokaj ĝardenfestoj kaj jurnalaj. Estas 105 anoj en la Federacio.

La *Nord-Orienta Federacio*, kiel kutime kunvenis tri fojojn dum la jaro. Ĉe la marta kunveno S-ino Davies parolis pri la proponita Esperanto-Domo. Du-tri aĉetis akciojn kaj du ĉeestis la jarkunvenon ĉe la Konferenc-Centro 'Spode' en oktobro. Lokaj ĵurnaloj kaj Radio-Newcastle informas pri la kunvenoj. Estas 'Unua Leciono' en tri publikaj bibliotekoj. La sola Esperanto-grupo en la Federacio estas en *Newcastle* kiu starigis Esperantobudon okaze de 1-a de Majo-Festo kaj disdonis informilojn. En *Skotlando* la Federacio Esperantista okazigis du eventojn dum la jaro raportitaj aliloke, la skotan kongreson en Crieff en aprilo kaj la studrondon en Dunblane. Ĉiu allogis proksimume 35 personojn. Okaze de 'Esperanto Semajno' la *Glasgova* Grupo muntis ekspozicion en la ĉefa urba biblioteko. La bulteno 'Esperanto en Skotlando' daŭre aperas kun interesaj artikoloj kaj poemoj, ofte pri Skotlando. La *Sud-Orienta Federacio*, kies sekr. George Stephenson mortis fine de la somero, kunvenis en

Hastings, Redhill, Dorking kaj Maidstone kaj inter alie aŭdis pri vizito de John Green al Brazilo, Ankaŭ estis ekskurso al *Hastings*, ĝardenfesto en *Maidstone*, unutago kurso en *Brighton*, kaj poste prelego de Reto Rossetti ankaŭ en Brighton. Gastoj el Francio kaj Belgio venis al semajnfina aranĝo en Aylesford, Nova grupo funkcias en *Gravesend*, Kent, kaj nova ano Rodney Ricketts, en Hythe kiu estas instruisto, jam havas Esperanto-kurson en sia lernejo.

Dum la ĉiusemajnaj klubvesperoj de *La Londona Esperanto-Klubo* la membroj profitis la kutiman aron da prelegoj distraĵoj kaj diversgradaj kursoj. Dum la paŭzoj kaj la festvesperoj, abundis okazoj por paroli inter si kaj kun eksterlandaj vizitantoj. Prelegantoj kaj artistoj venis el Hungarujo, Pollando kaj Hindujo. Programeroj variis de birdsonoj a muziko, de mez-amerikaj lingvoj a ĉiutaga Esperanto, de Sokrato al "Kie iĝi milionulo" kaj de subtera energio a ŝpinado. La kluba ĥoro partoprenis en la opereto "Proceso per Jurio", prezentita ĉe la brita Esperanto-kongreso en Weston; ĝi kontribuis ankaŭ al festoj kaj a diservo memore al Irene Schilperoord La jarkunveno de la *Okcidenta Federacio* okazis dum julio ĉe la hejmo de Ges-roj Pitt en Leominster kun posta vagado kaj ĝardena pikniko. En Aŭgusto oni aranĝis specialan kunvenon ĉe la ekspozicia centro en Birmingham dum la internacia kongreso de Rotarianoj por renkonti kaj kune manĝi kun Esperantistaj Rotarianoj el Japanio Francujo kaj Britujo. Sekvis invitoj por la sekretario de la Federacio fari prelegojn pri Esperanto al du Rotaria kluboj. Okaze de Esperantotago esti ekspozicioj en la centra biblioteko en *Wolverhampton* kaj du branĉbiblioteko en *Birmingham*. Zamenhof-tago esti komuna festo je invito de la Esperanto klubo de Birmingham.

De eta komenciĝo en marto, 1984 kun malpli ol 60 anoj disigitaj en Kimrujo kaj nur unu jam establita grupo en Nord-Kimrujo, la *Esperanto-Federacio*

de *Kimrujo* ekspansiis tiom rapide, kion povus envii la aliaj longe establitaj federacioj. La *Nord-Kimruja Esperanto-Societo* jam dividiĝis en du klubojn en Gwynedd kaj Clwyd kaj du novaj grupoj naskiĝis en *Suda Kimrujo*, la *Sud-Kimruja* por Gwent kaj Glamorgan kaj la *Sud-Okcidenta* kun anoj en Swansea kaj pli okcidenten. Unu-tagaj kursoj en Bangor kaj Abergavenny tre sukcesis kaj rezultis el tio favoraj artikoloj en ĵurnaloj kaj radio, kimraj kaj anglaj. Samideanoj en *Kimrujo* antaŭ-rigardas al la 69-a Brita Kongreso en Llandudno por krei ankoraŭ pli da intereso kaj allogi pli da anoj.

La tuta membraro de la *Nord-Okcidenta Federacio* estas 230 kaj grupoj troviĝas en Blackburn, Burnley, Chester, Manchester, Morecambe Bay, Rochdale kaj Stockport. (Raportoj, ke la grupoj en Blackburn kaj Burnley ne plu ekzistas, estas malpravaj.) Estis tri konferencoj dum la jaro en Denton, Chester kaj Morecambe Bay kun ankaŭ komitatkunvenoj. Premiojn por EAB-ekzamenoj dum 1983 gajnis S-ro R. Brothwell, kiu bonege sukcesis. La *Kimroj* forlasis la Federacion por starigi la propran. La *N-Okcidenta Federacio* donacis al ili ne nur la kapkotizojn, sed ankaŭ £50 por helpi la novan organizaĵon. En februaro D-ro Ranga vizitis *Manĉestron*, kie li parolis; en majo Jadwiga Gıbczynska parolis en *Kendal*; dum oktobro, en la Universitato de Manchester, kolegio *Holly Royde*, prelegis D-ro Ivo Lapenna, Reto Rossetti, Don Lord kaj Graham Blakey.

FAKASOCIOJ KAJ ALIAJ: La *Britaj Kristanaj Esperantistoj* (FBCE) havis nekutime aktivan jaron precipe pro subita peto organizi internacian kongreson de Kristanaj Esperantistoj por anstataŭigi la nuligitan en Hamburgo. Tio okazis en kolegio 'Easthampstead Park' apud Reading kaj interalie la anoj ĝuis koncerton de la Londona Esperanto-Horo. Tiu ĥoro ankaŭ helpis en la diservoj okaze de la Brita Kongreso en Weston, ĉe memordiservo en Londono por

Irene Schilperoord kaj por la kristnaska diservo en Decembro. Aliaj regulaj diservoj okazas monate en Bristol, Bournemouth kaj Manchester. La 'FBCE' –organo 'La Kristana Alvoko' regule aperas kaj la Prezidanto David Featherstone sukcese pritraktis kun la Brita Biblia Societo por la represo de 'La Sankta Biblio' – nun denove aĉetebla.

La *Esperantista Komputila Klubo* nun havas proksimume 30 anojn kaj la unua numero de *Komputila Bulteno* jam disendiĝis.

'*Norwich Jubilee Esperanto Foundation*' (NOJEF) denove havis sukcesan jaron. La nuna kapitalo estas iom pli ol £21,000 kaj la jara interezo proks. £2,100. Per tiu sumo la fonduso subtenis la vojaĝojn de 25 gejunuloj enlandaj kaj invitis 4 eksterlandanojn kiuj venis el Brazilo, Hindio, Hungariujo kaj Pollando. Preskaŭ 150 ekz. de la dupaĝa jarraporto estas dissenditaj, proksimume la duono al ne-Esperantistoj. Kvankam la tuta Esperantistaro profitas de la aktiveco de la fonduso, malpli ol 3% kontribuas al ĝi kaj la nombro de konstantaj subtenantoj, pro mortoj, malkreskas.

Esperanto-Feria Asocio de Britujo. Ĉi tiu turista sekcio funkciis dum 1984, sed pli modeste. Pere de ĝi, unu solulo tre ĝuis novjaron (1984) Esperanto-ferion en Budapeŝto, kelkaj anoj ĉeestis Bulgaran Esperanto-lernejon/ferion en la montaro, kelkaj ĉeestis la nacian Esperanto-Kongreson en Pollando kaj aliaj faris vojaĝon al Moskvo, Kiev kaj Leningrado kie ili renkontiĝis kun rusaj samideanoj, eĉ gastis ĉe geedziĝa ceremonio. La *Brita Esperantista Pac-organizo* dissendas regule sian bultenon ('se vi volas pacon, preparu pacon' L.L.Z.) kaj kunlaboras kun la Mondpaca Esperantista Movado kaj afiliigis kun U.N.A., kaj aliaj pac-organizoj.

EKSTERAJ RILATOJ: La ŝere festo de la Parlamenta Esperanto-Grupo okazis en januaro kaj ĉeestis ĝin 43 parlamentanoj inkluzive unu registara

ministro, reprezentantoj de BBC, CILT, DES, ILEA kaj ĵurnalistoj de kelkaj naciaj ĵurnaloj.

Estis daŭra korespondado dum la jaro kun registaraj aŭ duonregistaraj instancoj, krom kun la BBC. La plej interesaj kontaktoj estis kun la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, dum plej afable traktis nin Brita Konsilio (British Council).

Estis kvin apartaj okazoj kiam ni sukcesis trafi la naciajn ĵurnaloj kaj radio-televidan reton. Tiuj estis 1) la P.E.G.-ŝerea festo, 2) la Internacia Junulara Kongreso, 3) la Brita Kongreso, 4) la nova kurso ĉe Londona Universitato, 5) Esperanto-semajno. Oni rajtas scivoli ĉu aliaj asocioj en aliaj landoj simile sukcesis rilate publicon naciskalan, kaj oni devas agnoski, ke la brita Esperantistaro ne fanfaronas pri tio, ĉar ĝi fariĝis tute normala afero. La televida programo "High Hopes" (Altaĵ Esperoj), la radio elsendo "Any Questions" (Ĉaj demandoj?) kaj la raportoj pri la Londona Universitata Kurso speciale elstaris.

KURSOJ SEMAJNFINAJ KAJ ALIAJ:

En februaro estis semajnfina kurso en Belstead House, Ipswich kun kvar instruistoj kaj 37 lernantoj; en marto estis unu-taga en Bangor kun tri klasoj kaj 35 ĉeestantoj. Por la dua jaro Esperanto estis unu el la studobjektoj en la someraj feriokursoj de la Universitato de Loughborough. De la 22-a ĝis 28-a de julio Stephen Thompson instruis unu klason. En aŭgusto la ĉiujara, sestaga, tri-nivela kurso okazis en Barlaston kun gastprelegisto Belka Beleva, profesia aktorino el Sofio. Je la 15-a de septembro okazis du unutagaj seminarioj en Kimrujo, unu en Llanfoist, Abergavenny, kaj unu en la teknika kolegio Llandrillo, Clwyd. La sekvantan semajnfino estis semajnfina kurso ĉe Knuston Hall, Northants, kun tri niveloj; kaj la ĉiujara studrondo en Dunblane, Skotlando allogis 30 partoprenantojn. En oktobro estis unutaga seminario en Bradford trinivela, semajnfino en Spode, Staffs. kiu estis jarkunveno de la

organizo por Brita Kulturdomo kune kun kurso por komencantoj, kaj ĉe la kolegio Holly Royde, Universitato de Manĉestro, okazis la kutima semajnfino de prelegoj en Esperanto, nun sub gvido de D-ro John Wells.

U.E.A.-Delegitoj: La britaj delegitoj en la jarlibro por 1984 estas jenaj:

Delegitoj (D).....	90	(88)
Vice-Delegitoj (VD).....	10	(9)
Junular-Delegitoj (JD)	0	(0)
Fak-Delegitoj (FD)	120	(123)

220 220

Bedaŭrinde, iuj delegitoj mortas ĉiujare kaj la novaj dum 1984 ne superis la mortintojn.

TIE kaj TIE:

La modestaj enspezoj rezulte de vendo de uzitaj poŝtmarkoj daŭre envenas danke al la kuna laboro de *John Brownlee* kaj *Douglas Catterall* en la oficejo, *Frank Rapley* en sud-orienta Londono kaj *Bertram Potts* en Nov-Zelando, kaj granda skatolo da uzitaj poŝtmarkoj, kolektitaj de *S-ino Butler*, Northampton-grupo, estis ricevitaj en Julio. Dum la jaro du novaj libroj aperis verkitaĵ de nia ano *D-rino Marjorie Boulton*, 'Faktoj kaj Fantazioj' kaj 'Ne nur Leteroj de Plum-amikoj', kaj nova 'Esperanta Antologio' de nia redaktoro de B.E. *William Auld*. Ankaŭ en Oxford, *D-rino Boulton* povis provizi al la Biblioteko 'Bodleian' informojn, pere de la delegita reto, kiujn la biblioteko, ĝis tiam, ne povis mem akiri. Eble interesas al la anoj scii, ke nia *honorofica sekr.*, krom la alia laboro helpe en la Oficejo, faras multe de instiga, instrua kaj helpa laboro flegi novajn Esperantistojn en Afriko kaj Azio per korekto de ekzercaĵoj, sendado de libroj, kasedoj, diskoj kaj ĝenerala korespondado. Eĉ en Etiopio ekĝermis intereso por lerni Esperanton. Ankaŭ aparte helpas samriate *David Curtis* en Weston-super-Mare, *Hilary Chapman* en Kimrujo kaj *Bill Edwards* en Bournemouth.

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO

Registrita Bonfara Asocio N-ro 272676

140 Holland Park Avenue, London W11 4UF

La 8-a Jarkunveno de Esperanto-Asocio de Britujo okazos je Dimanĉo la 7-a de Aprilo, 1985 en Canolfan Aberconwy Centre, Llandudno je la hovo 10.30-a

TAGORDO

1. Akcepti la protokolon de la antaŭa Jarkunveno.
2. Ricevi la jarraporton de la Administra Komitato.
3. Ricevi la kontresumon kaj bilancon.
4. Fiksi la jarkotizon por la venonta jaro.
5. Elekti funkciulojn kaj anojn de la Administra Komitato.
6. Difini la honorarion por la revizoro.
7. Transdoni al la Administra Komitato por konsidero, iujn ajn komentojn kaj sugestojn de la anoj.

PROPONITOJ POR ELEKTO AL LA ADMINISTRA KOMITATO:

FUNKCIULOJ:	Prezidanto	S-ino M.T. Austin
	Vic-Prezidanto	S-ro A. Díaz
	Vic-Prezidanto	S-ro B.E. Barker
	Honorofica Sekretario	S-ro J. Brownlee
	Honorofica Kasisto	S-ro P.A. Danning

KOMITATANOJ:

S-ino M. Davies
 F-ino A.B. Duerden
 S-ro H.E. Platt
 S-ino M. Shackelton
 S-ino S.V. Sly
 S-ro S.K. Thompson
 (Ĉiuj nunaj anoj)

John Brownlee
Honorofica Sekretario

NUN BARLASTONO JUBILEAS

La famaj kursoj, laŭ kelkaj, trejnado por esperantistaj sturmtaĉmentoj, komenĉiĝis en 1960, do ĉi-jare festos sian Arĝentan Jubileon. Kursanoj tie foje esprimis deziron, ke estu du semajnoj da Barlastono – ĉi jare estos ja du semajnoj!

La 10-an ĝis 16-a de aŭgusto: la kutimaj streĉaj sed interesaj kursoj por komentantoj, progresantoj kaj geherooj; kun pluraj ekstraj eroj kaj festaj eventoj.

La 17-an ĝis la 23-a de aŭgusto: skale modesta, sed espereble tre interesa *Konferenco: Internaciaj Aspektoj de Adolta Klerigado: Lingvo kaj Internacia Inter-*

kompreniĝo.

En ambaŭ semajnoj la parolontoj inkluzivas: William Auld, Marjorie Boulton, Ivo Lapenna kaj Paul Neergaard – kaj aliajn.

Kosto (kovrante ankaŭ loĝadon kaj manĝojn): Kursoj £91, konferenco £100; ambaŭ, £181. Rabatoj por Staffordŝiranoj, pensiuloj, senlaboruloj kaj malavantaĝuloj. Unuopa ĉambro, suplementa £1 ĉiunokte.

Skribu al: Warden, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG.

VERDAJ BIOGRAFIOJ

Jam antaŭ iom da tempo mi legis, ke la Unua Premio “Antoni Grabowski” 1984 iris al D-ino Marjorie Boulton. Mi tutkore gratulas al la doktorino pro la premio, ĉar mi estas fanatika leganto de ŝiaj libroj, ĉefe “Kontralte”. Laŭ la informo kiun mi legis, ŝi ricevis la premion ne nur pro ŝia kontribuo al ni literaturo dum la dudek lastaj jaroj, sed ankaŭ “. . . pro ŝia studo pri Julio Baghy, *Poeto Fajrakora*, eldonita lastjare . . .”. Mi volis legi tiun studon antaŭ ol skribi pri verdaj biografioj. Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne trovis la libron por akiri ĝin. Eble iu verda koboldo metos la libron sur breton de la Esperanto-Centro kiam vi legas ĉi tiujn liniojn!

Mi deklaras mian avidan intereson pri biografiaj libroj. Ke biografioj estas popularaj libroj en iu ajn lingvo oni povas konstati pro la granda nombro de tiaj libroj eldonitaj. Ni, ĉiuj, havas sciivolemon pri tio kion faris aŭ ne faris homoj famaj, malbonfamaj aŭ nefamaj! Dum en nacilingvaj literaturoj ni abunde povas legi pri la faraĵoj de verkistoj, politikistoj, episkopoj, generaloj, k.t.p., en la verda mondo tia literaturo preskaŭ ne ekzistas.

Prenu la katalogon 1984/85 de la libroservo de UEA kaj vi trovos la sekcion “biografio” de paĝo 253 al 260. Plejparte ili estas broŝuroj de 19, 22, 35 aŭ 44 paĝoj. Nur iuj estas veraj libroj kun 293 paĝoj kaj eĉ 425? Kiom da libroj pri vivintaj aŭ vivantaj homoj de la verda nacio troviĝas en ĝi? Dek-tri, kaj el tiuj, ok estas pri Zamenhof. Do restas kvin libroj, inter kiuj troviĝas la aŭtobiografio de nia konata samideano Horace Clayton – tamen en nur 51 paĝa libreto – kaj la verko de Haupenthal pri Schleyer, kreanto de Volapuk, ne povas esti tre profunda havante nur 35 paĝojn. Fine estas tri libroj: la aŭtobiografio “Mia Vivo” de Ĥristovski, “Vivo de Lanti” de

Borsboom kaj tiu de Holzhaus pri Trompeter.

Ni konas malmulton, mi kuraĝas diri nenion, pri la personecoj de la pluraj homoj kiuj helpis al Zamenhof firmigi la lingvon inter la popoloj dividitaj. Eĉ pri Zamenhof mem ni scias malmulton! Ĉiu libro verkita pri li estas historio pri la fruaj jaroj de Esperanto pli ol biografio pri Ludoviko. Neniu libro priskribas detale lian personecon, ĉefe ekster la verda mondo. Mi scias ke li fumis cigaredon post cigaredo, ne ĉar mi legis tion, sed ĉar samideano kiun mi konis antaŭ multaj jaroj diris tion al mi. Li kaj lia edzino vidis Zamenhofon en tri Kongresoj. Ĉu la majstro ĉiam regis sin? Ĉu li batis la katon kiam li aŭdis pri la perfido de Beaufront? Fakte, ĉu li havis katon en la hejmo? Li naskiĝis sub la signo de Arkopafanto, la signo de saĝuloj kaj konsilantoj. Neniu ankoraŭ studis la karakteron sufiĉe profunde por diri kial li ne amis sportojn kaj vivon en la plenaero kaj ne evitis la fumoplenajn ĉambrojn: trajtoj kontraŭ la tendencoj de arkopafantuloj. La edzino Klara naskiĝis sub la signo Pesilo, kiu akordiĝas kun Arkopafanto nur pri amoro. Kiom da disputoj estis inter ili pro malkonsentoj rilate al la familio, aferoj kaj geamikoj?

Bona biografio pri Beaufront estus tre interesa. De post 1908 oni konas lin kiel perfidulon kaj homoj ankoraŭ memoras la vortojn “kiso de Judaso . . .” flustritajn de Bourlet dum epizodo en la Kongreso de 1906. Tamen li multe laboris por la movado dum preskaŭ dudek jaroj. Oni ankaŭ volus scii pli ol ni nun scias pri Bourlet mem, kaj pri Grabowski, Bolingbroke Mudie, Hodler . . ., la listo estas longa! Ni scias iomete pri iliaj verdaj vivoj sed nenion pri iliaj vivoj ekster nia mondo!

Estis pro tiu manko de detaloj pri niaj

famuloj ke franca amiko komencis kolekti diraĵojn, flustraĵojn, komentojn, agojn kaj detaletojn pri kaj de eminentuloj kaj ne-eminentuloj. Li havas dosierajn skatolojn plenajn de kartetoj kun eretoj kiujn li aŭdis kaj vidis dum sia longa verda vivo. En tiuj kartetoj troviĝas legioj da nomoj kiel ekzemple homoj kiuj ebruiĝis dum oficialaj akceptoj, tamen malmultaj estas bonkonataj. Unu karto rilatas pri vangofrapo kiun norvegino donis al eminentulo. Li ankaŭ havas tion kion edzino de bonkonato konfidence diris pri sia edzo al amikino dum veturado per tramo en Kongresa urbo, ne sciante ke la du viroj en la malantaŭaj seĝoj komprenis ĉiun vorton diritan!

Kio okazos al tiuj skatoloj kiam la posedanto mortos, mi ne scias. Ĉu ili iros al la Esperanto-Muzeo de Vieno? Kia minejo povas esti la skatoloj por venontaj biografiistoj! Iuj homoj diros ke la publikigo de tia informo faros nenion por ni. Iuj, male, opinias ke detaloj pri homa ĉiutaga vivo normaligas nin! Ili montras ke la verda vivo estas natura kun virtoj kaj malvirtoj. Ĉu *Estonino* kuraĝos verki libron "Aventuroj kun Miaj Du Verdaj Edzoj", kaj L---, eble, pri "Aprecoj kaj Karesoj en Verdolando"? Se ni konus la detalojn ni ne estus frustrantaj, kiel nun ni de tempo al tempo faras, pri tio kio okazas en verdaj renkontiĝoj. Mi ne multe kongresas, mi federacias, tamen konas sufiĉe pri nia vivo por kredi multajn flustrojn veraj! Mi nun poluras miajn memorojn pri la federacio kaj eventoj en la regiono. En la manuskripto jam estas detaloj pri pluraj mensaj murdoj, misteraj bruoj en anguloj de la klubejo, la mistero de Ludoviko (ne estas la vera nomo) nun 43-jara, la *ĉeestantoj* kiuj malofte aperas en kunvenoj, intimaj ludoj dum Zamenhofaj vesperoj, natur-studaj esploroj dum ekskursoj al la kamparo, Se iu eldonisto interesiĝas pri "Aŭtobiografio de Verda Veterano", nepre kontaktu min!

Alariko

NEKROLOGOJ

Mortis je la 9-a de Novembro, 1984 Lt.Col. D. H. Hall-Smith, Stonygate, Leicester dumviva ano de BEA/EAB de post 1963 kaj dumviva ano de UEA de post 1968. Kondolencojn al lia edzino. S-ino C. A. (Belle) Milner, Gidea Park, Romford, Essex mortis je la 17-a de Decembro, 1984 en hospitalo en Hexham, Northumberland en la aĝo de 75 jaroj. Fidela ano kaj bibliotekistino de la Havering Grupo dum pli ol dek jaroj-ofte gastigis la grupanojn – kaj ano de BEA/EAB de post 1974. Dum multaj jaroj estis volontula helpanto en la Oficejo kaj zorgis, inter alie, pri libromendoj kaj sendado de 'lecionoj'. Kondolencoj al ŝiaj familianoj.

FINO DE GEONKLOJ ESPERANTISTAJ

J. H. (Bert) SULLIVAN tre bedaŭras ke, pro ne inversigebla difekto ĉe la vidpovo de unu okulo, kaj la sekva neceso malpliigi sian laboron, *ekde la 5a de februaro 1985 li devis ĉesigi la funkciigadon de GEONKLOJ ESPERANTISTAJ*, kiun li fondis en 1958 kaj administris dum pli ol 26 jaroj. (Dum tiu tempo li trovis geonklojn por preskaŭ 1400 infanoj tra la mondo.)

Kompreneble, se iu samideano estus preta daŭrigi tiun laboron, s-ro Sullivan tre volonte transdonus siajn listojn, dokumentojn kaj specimenaĵojn kontaktilojn k.t.p. Tiukaze bonvolu skribi al li ĉe:

3 Berwick Avenue,
URMSTON, Manchester,
Anglio M31 1PS.

Fine li volas tre sincere danki ĉiujn kiuj subtenis la laboron korespondante kun infanoj tra la mondo, kaj ĉiujn kiuj tiel malavare – kaj ofte anonime – sendis mondonacojn por teni viva la servon al la infanoj de nia movado. Kvankam neeviteble okazis malsukcesoj, multaj geknaboj kaj plenkreskuloj feliĉe korespondadis dum jaroj.

ATESTAĴO PRI LA TAŬGECO DE LA ANGLA KIEL INTERNACIA LINGVO

Mi citas provoĵn de ĉino traduki en la anglan, nepre ne por moki lin aŭ ŝin. La provoĵ kredeble reprezentas longan, malfacilan penadon, kun vortaro; ni pensu, kiel absolute malsamaj estas la ĉina kaj la angla; ni memoru ankaŭ, ke preskaŭ neniu el ni kapablas skribi eĉ unu frazon en la ĉina. Kaj ni memoru, ke ne nur tradukisto devis turmenti sian cerbon por iel trovi frazojn, kiujn li kredas ĝustaj, sed presisto devis penadi en lingvo nekonata.

Sed ĉu vere decas, trudi nian ege malfacilan lingvon al homoj, kies konsciencia penado rezultas tiel katastrofe? Mi ĵus akiris elegantan hokon por mia banĉambra muro. La hokon oni fabrikis en Tajvano. Laŭ la anglalingvaj instrukcioj: "By applying to both side adhesive tape with high and strong quality, Ko-hao hanger is a modern, joyful interior hanger . . . especially it makes living-room, waiting-room and porch hall harmonious. Please pick it up according to the weight of article. Colors are provided in abundance. The limited weight is 800 g. Good for hanging umbrella, shopping cage, handbag, coat, hairdryer, windbell, cloth-sign, curtain, soccer football etc." La instrukcioj por fiksi la hokon estas sufiĉe klaraj, kvankam ne modeloj de angla prozo; poste sekvas kelkaj konsiloj, inter ili:

"Please set up to even and smooth places where is suitable for dress board, con-cret, tile, glass, mirrow, stainless steel etc. Please don't set up to uneven wall, moisture wall or wall with paper or closs things . . . Don't stick to the tile, dress board, etc. (tion mi ja ne faris.) . . . While

taking out the inside paper, if the glue is touched by hand, the adhesive effect will be weakened. . ."

Mi sufiĉe studis fremdajn lingvojn, el kiuj la sola ne-eŭropa, kiun mi iomete studis, la hindia, frue venkis min tute, por havi ian koncepton, kiom de penado ĉi tiu traduko kostis al ĉino . . . por fari tian fuŝon!

Nu, la hoko mem estas tre ĉarma hoko.

Marjorie Boulton

NATURAJ LEĜOJ DE LA ESPERANTISMO

Leĝo de la Gastparolanto

La interesiĝo pri Esperanto de Rotaria sekretario estas rekte proporcia al la malpleneco de lia programo.

Leĝo pri Oficiala Aprobo

La aprobo pri Esperanto esprimita de politikisto estas inverse proporcia al lia potenco en la registaro, aŭ, se lia partio estas opozicia, ĝi estas rekte proporcia al la malforteco de lia partio.

Leĝo de la Celo en Gloro

Kiam aktiva esperantisto atingas postenon, kie li povas antaŭenigi Esperanton, li ĉesas esti aktiva esperantisto.

Leĝo pri la Dekobligoj

Nova esperantisto, kiu elpensis mirindan rimedon por dekobligi la nombron de la esperantistoj, baldŭ seniluziiĝos.

Leĝo pri la Kontraŭuloj

Publika malaprobo de Esperanto estas inverse proporcia al la nombro de la faktoj cititaj.

Ĉiamvalida Leĝo de la Fina Venko

La fina venko okazos morgaŭ.

Leĝo de la Neŭtraluloj

Kiu ne estas kontraŭkomunisma, tiu ne estas politike neŭtrala.

venu al Loughborough!

SE PLAĈUS AL VI intensive studi Esperanton parte en lingva laborejo dum preskaŭ ses horoj tage dum unu semajno – venu al Loughborough!

Se plaĉus al vi loĝi dum tiu semajno en universitataj ĉirkaŭaĵoj, kaj profiti de ĉio, kion tiuj ofertas: ĉiajn sporteblecojn, bibliotekon, barojn kaj bonegajn manĝojn – venu al Loughborough!

Se plaĉus al vi ĝui diversajn distraĵojn dum la vesperoj – eble dancado, koncerto, teatra aŭ kina vizito aŭ simile, akompanite de aliaj individuoj aŭ familioj, kiuj dum la tagoj sekvas aliajn interesajn kursojn – venu al Loughborough!

Se plaĉus al vi venigi vian tutan familion kaj scii ke eĉ la plej eta trovos intereson kaj estos bone zorgita – venu al Loughborough!

Don Lord kaj Stephen Thompson estos la instruistoj de dagrada (por progresantoj kaj progresintoj) kurso pri Praktika Esperanto en la Somera Programo de la Universtato de Loughborough de la 21-a ĝis la 27-a de julio '85 – tre bona okazo ellerni la lingvon antaŭ la mondkongreso. Kurso por komencantoj (duontaga) haveblas dum la sekvanta semajno. Petu broŝuron de

Centre For Extension Studies (BR)
University of Technology,
Loughborough,
Leics. LE11 3TU

MALLONGE

Esperanto-Domo Grésillon. Inter la 16a de junio kaj la 1-a de septembro okazos diversaj feriaj kursoj kaj prelegserioj. Adreso: Esperanto-Domo Grésillon, 49150 Bauge, Francio.

18a Internacia Renkonto Naturamika en Abaliget (apud Pécs), Hungario, de la 22a ĝis la 31a de julio. Esperanto-Feria

Asocio de Britio, Downham Reach, Nacton, Ipswich, Anglujo.

“**La Migranto**” estas trimonata, riĉe ilustrita Esperanto-revuo pri turismo, vojaĝoj, feriado, naturo, ekologio, naturprotektado kaj kulturaj aferoj. Ĝi estas eldonata de TANEF, t.e. Esperanto-Fako de la internacia (neesperantista) Naturamika Movado. Ĝi kostas jare (4 numeroj) 7.00 svisajn frankojn. Petu senpagan provekzempleron de: Liesel Nagel, Roseggerstr. 17, D-7800 Freiburg, F R Germanio.

Okazos en Oberkirch (Nigra Arbaro) antaŭ la 70a UK feriosemajno kun interesa turista kaj distra, sed ne tro streĉiga, programo. Petu detalan programon, alĝilon kaj koloran prospekton pri Oberkirch (kun Esperanto-teksto) de: Esperanto-Grupo Oberkirch, Fuchmattstrasse 23, D-7602 Oberkirch, F R Germanio.

SKOTA FEDERACIO ESPERANTISTA invitas vin al sia 80a Kongreso, 12-14 aprilo 1985, en Horselethill House (studentdomo de la Universtato), Glasgow, Skotlando. La kosto, inkluzive de loĝado kaj manĝoj, ne estos, pli ol £37. Stanley Nisbet, 6 Victoria Park Corner, Glasgow G14 9NZ (Tel. 041 959 5801).

Romans, pordo de Provenco. La Esperantista Grupo “Bona Stelo” proponas Internacian Renkontiĝon en Romans (Francujo) de la 29a de junio ĝis la 6a de julio, kun tre diversa kaj tre interesa programo. Grupo Bona Stelo, 26100 Romans, Francujo.

Seminario pri metodiko. En Bad Saarow (ĉe Berlino) okazos de la 9a ĝis la 14a de decembro 1985 seminario pri la temo “Problemoj de metodiko de Esperanto-instruado al plenkreskuloj”. Skribu al: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, DDR-1080 Berlin, Charlottenstr. 60.

Kongreso de Esperanto okazos en monato Januaro, 4a-11a, 1986, en Aŭstralio. Ĉe bordo de la Indiana Oceano kaj en la sudhemisfera somero, la Aŭstralia Esperanto-Asocio gastigos vizitantojn en urbego Perth – ĉefurbo de ŝtato – Okcidenta Aŭstralio. Demandoj al A.E.A., aŭ 207 Brisbane Street, Perth 6000, Aŭstralio.

Seminario de TEJO “Kooperativoj kaj junularo” okazos de la 22a ĝis la 28a de septembro 1985, en urbo Tuzla (Bosnio, Jugoslavio). Informojn liveras: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Internacia Konstruejo. 10a – 30a de julio 1985. Por junuloj (10-16 jarojn aĝaj) en Parko Natura Regiona de Lubéron (Provenco, Francio). Kontaktadreso: Ecolonie, 98 rue Colbert, 84120 Pertuis, Francio.

La 85 an Eŭropan Poezio-Festivalon (23a-27a de oktobro) ankaŭ esperantist(in)o aŭ du partoprenos. Eble la tradukaĵoj aperos en la Festival-Kajero. Sekretariejo: ĉe s-ro E. van Itterbeek, Blijde Inkomststr. 9, Leuven, Belgio. Speciala Esperanto-kontaktadreso: s-ro Marc Vanden Bemt, Duisburgsestr. 12, B-3030 Leuven-Heverlee, Belgio.

HELPOPETO: LA POEZIO DE L.N.M. NEWELL

–Edwin de Kock

PRO KONVINKO, ke la originala poezio de L.N.M. Newell (1902-1968), kiel ajn malabunda, konsistigas – pli ol tutaj volumoj far multaj aliaj homoj – gravan kontribuon al la Esperanta literaturo, mi volas prepari pri tio la plenan kolekton kun Antaŭparolo, kaj aranĝi libroeldonon.

Tiucele mi devas akiri permeson de la kopirajtigist(in)o, ĉiujn tekstojn kaj biografiajn detalojn. El la plumo de

Newell mi havas nur 12 poemojn originalajn, nome tiujn kiuj aperis en **Dekdu Poetoj** kaj **Esperanta Antologio** (ambaŭ eldonoj), kiel ankaŭ kelkajn erojn senditajn al mi far la poeto mem, el Largs Bay, Suda Aŭstralio, dum 1960.

Ĉi-lastaj estis “Brilega mondo”, “La vitra globo” kaj “Mi vidis ŝipon”, kune kun du finaj versoj de lia tre konata “La ruĝa tramo”, ĝis nun verŝajne neniam publikigitaj, sed laŭ Newell nepre aldonendaj:

*El la mallumo, al neon-radio,
Alfluas ruĝ-fantoma procesio.*

Povas esti, ke iu leganto havas ĉe si originalan poemon en manuskripto aŭ – kio povus montriĝi preskaŭ egale valora – en revuo. Tradukojn mi tamen ne deziras.

Per tio ni honorus forpasintan poeton kaj pliriĉigus la trezorejon de la Internacia Lingvo.

Bonvolu vin turni al mi ĉe *Posbus 143, Bon Accord, 0009, Respubliko de Sud-Afriko.*

Mi ankaŭ petas, ke la revuoj reaperigu ĉi tiun alvokon.

LONDONO VOKAS

*La historio de la unuaj 75 jaroj
de la Londona Esperanto-Klubo,
verkita de Harry Holmes.*

A5, kun 132 paĝoj kaj multaj ilustraĵoj.
£3, aŭ ekvivalento. Mendu ĉe BEA,
UEA, ĉe via libroservo aŭ rekte de
la Londona Esperanto-Klubo,
153 Drummond Str., London NW1.
Ĝirokonto 54 661 0005.

ESPERANTO-ASOCIO DE BRITUJO
SPEZOJ POR LA PERIODO ĜIS 31-a OKTOBRO 1984

<i>MALNETAJ ENSPEZOJ</i>	1984	1983
	£	£
Kotizoj.....	9,179	7,927
– kapkotizoj (por Federacioj).....	(1,089)	(1,088)
	<hr/>	<hr/>
Donacoj.....	8,090	6,839
Dividendoj/Interzoj – ĝeneralaj.....	2,261	1,929
Dividendoj/Interzoj – fondusoj.....	2,924	4,062
	<hr/>	<hr/>
	5,185	5,991
Kursoj.....	1,507	1,715
Ekzamenoj.....	354	248
Brita Kongreso.....	361	–
Perado.....	–	360
Gajno je vendo de investaĵo.....	637	–
	<hr/>	<hr/>
Tuta enspezo.....	18,144	16,190
Deficito.....	2,297	5,923
	<hr/>	<hr/>
	20,441	22,113
	<hr/>	<hr/>
<i>ELSPEZOJ</i>		
Kost-kontribuo al BEA.....	5,947	6,612
Lupago pro biblioteko.....	350	350
	<hr/>	<hr/>
	6,297	6,962
Afranko.....	1,039	1,338
Telefona.....	927	838
Paperaĵoj.....	675	478
Informmaterialo.....	23	860
	<hr/>	<hr/>
	698	1,338
Gazetoj (inkl. de ekspedkostoj).....	4,364	3,568
Biblioteko.....	10	47
Kursoj kaj ekzamenoj.....	2,263	1,498
Junularo Esperantiŝta Brita.....	200	207
Amortizo de ekipaĵoj.....	80	93
Revizora kosto.....	350	350
Riparoj.....	–	38
Publico.....	859	2,076
Komitato kaj volontuloj.....	1,396	123
Kortumo (kazo Hartridge).....	–	50
Publicity (Houghton).....	1,358	1,119
Konsultantoj.....	–	2,269
Diversaj debetoj.....	287	98
Aĝustigo de antaŭa jaro.....	198	101
Bank-kostoj.....	115	–
	<hr/>	<hr/>
Tuta elspezo.....	20,411	22,113
	<hr/>	<hr/>

LAŬ MIA OPINIO . . .

Seksismo

Mi bedaŭras la fakton, ke Jonathan P.R. Palfrey trovas parton de mia letero pri lingva seksismo frivola. Eble via komento pri humurmanko ankaŭ ĉi tie aplikindas.

Pli grava estas la akuzo fare de Sally Phillips, kiu kredas, ke miaj rimarkoj pri kontraŭmasklismo en la angla estas eksterloke en BE. Tamen Esperanto ne ekzistas en vakuo. Mia intenco estis montri, ke la problemo ne estas problemo nur de la internacia lingvo, kaj mi provis ilustrati mian tezon per ekzemploj el la etna lingvo, kiun mi plej bone konas. Mi ne konas publikajon pli taŭgan ol BE por tia ero el kompara lingvistiko inter la angla kaj Esperanto.

Ne nur la problemo estas simila, sed ankaŭ la logika reago al proponoj por solvo. La angla lingvo, simile al Esperanto, estas vivanta lingvo, kiu konstante ŝanĝiĝas, ne pro ies arbitraj dekretoj sed per la vojo de neologismo kaj arkaismo.

Tial mi ne intencis fari reformproponon, sed nur konstati, ke en Esperanto, malsimile al la angla, la problemo estas solvebla *en la kadro de la lingvo kiel nun ekzistanta*.

La uzo de "ge" kun singularo, ekzemple, latente jam ekzistas en nia lingvo. Demandu al iu ajn geesperantisto, kiel formi la singularon de plurala substantivo, kaj tiu (geli?) klariĝos, ke la regulo estas: forpreni la j-finaĵon. Jen tipa regulo de viva lingvo. Ĝi ekzistas, ne en gramatiklibro sed en la konscio de ĉiu uzanto de la lingvo.

Diri, ke tia simpla regulo ne validas por certaj vortoj, estus enkonduki netolereblan escepton al simpla gramatika regulo, kaj tia nenecesa kaj malutila escepto estus kontraŭ la bazaj konceptoj de la esperanta gramatiko.

D-ro Zamenhof diris, ke la ĉefa diferenco inter Esperanto kaj la naciaj lingvoj estas, ke en la internacia ĉiu

formo, kiu estas logika, estas korekta.

Tial la esperanta vorto, kiu respondas al la angla "parent" estas "gepatro", ne pro ia propono mia, sed pro la nedubbla fakto, ke la vorto, kiu respondas al "parents" estas "gepatroj".

La uzo de "-ul" kiel maskla sufikso ne estas tutsama, sed simila. Notu, ke mi sugestis, ke tiu uzo nur povos disvastiĝi post la arkaigo de la pleonasma "-ulin". De Saussure, kiu formulis la principojn de neceso kaj sufiĉo, konsekvence uzis formojn, kiaj "virgino" anstataŭ "virgulino", ktp. Jam en 1913 la Akademio akceptis tiujn Saussure'ajn principojn, do oni povas (eble eĉ devas) uzi "-in" senpere post adjektiva radiko. Do: klera virino estas klerino, blinda virino estas blindino, kaj studenta virino estas studentino (kaj ne studentulino) kaj tiel plu. Tamen se klera virino estas klerino, la vorto "klerulo" ne povas signifi kleran virinon, sed devas temi pri viro. Por sensekse paroli pri klera persono, oni povas diri aŭ "geklerulo" aŭ "geklerino", eble eĉ (ĉar "gi-" uziĝas nur por vivaj estaĵoj) "geklero".

Kompreneble, ĉi tiu ne tute kongruas kun la Fundamenta difino de "-ul", sed la ŝanĝo okazus ne pro arbitra reformo, sed per la Zamenhofe sugestita proceso de arkaigo de malnova formo, kiel jam okazis ĉe aliaj terminoj.

Mi neniel do kredas, ke Esperanto bezonas reformon por la nuna koncepto de seksa egaleco. Nur necesas rekono de natura evoluo de vivanta lingvo.

Rik Dalton

(Tamen, studenta virino jam nun estas studentino, pro la simpla fakto, ke substantiva participo ĉiam signas personon. En studentulino – formo neniam ĝis nun vidita – la -ul estas komplete pleonasma, same kiel ĝi estas pleonasma en la tro ofte renkontata formo konatulo. Kaj mi iom miras, kiel facilanime amiko Dalton pretas lezi la Fundamenton. – Red.)

Verda martiro

En la BE, majo-junio 1984, mi legis kun intereso, ke pluraj britaj esperantis-

toj donis al siaj domoj esperantan nomon. La skribinto demandas, ĉu ni konas ion similan.

Jen, kie mi naskiĝis, malgranda vilaĝo en Castilla (Hispanujo), ni havas “-Plazuela de Esperanto”, malgrandan placon aŭ placeton. S-ro Amado Hernandez, kiu donis la nomon, estis instruisto, pentristo kaj esperantisto. Li pentris sur la antaŭa muro de sia domo grandan verdan stelon, kaj skribis: “Argujillanoj lernu Esperanton”.

Tio estis antaŭ multaj jaroj, eble pli ol kvindek. Bedaŭrinde, dum la Hispana Civila Milito la faŝistoj ordonis frotlavi ĝin, car ili diris, ke tiu kvinpinta stelo estas komunista; kaj lin ili kruele mortigis.

La verda koloro ne facile malaperis, kaj la faŝistoj ekkoleris; do ili ordonis kovri la stelon per griza koloro. Dum tiuj jaroj la griza koloro protektis la verdan, sed nun estas falinta, kaj la verda koloro reaperas kaj estas preskaŭ tute videbla. La vortoj estas iom videblaj, sed mal-facile legeblaj.

Mi pensas, ke tiu samideano meritas simpation de la Esperanto-movado, kaj ke ni devus, iel, eternigi lian memoron. Ĉu mi povas scii la opinion de niaj legantoj?

Mi konservas kun alta estimo Esperanto-gazetojn de 1928-1931, kiujn li metis kune por fari libron. Estas tre interese, legi malnovajn gazetojn.

Nun mi demandas, ĉu s-ro H.S. Chapman, aŭ alia persono, konas iun straton, placon aŭ avenuon kun esperanta nomo?

V. E. Hernando

(En la libro “Doktoro kaj lingvo Esperanto” de Adolf Holzhaus, p.405-411, troviĝas listo de 353 stratoj, placoj ktp, en 329 urboj de 26 landoj, kun la nomo “Zamenhof” aŭ “Esperanto”. En Britujo verŝajne troviĝas nur po unu, ambaŭ en Stokeon-Trent. - Red.)

Pro miaj pekoj

Nek pro honto nek pro timo mi uzis la

pseŭdonimon “Inodigna Inami” ĉe mia poemeto (ĉu?) en n-ro 860, sed pro tio, ke (1) mi sampoŝte kaj propranome submetis ankaŭ artikolon nome “Fraŭloj”, kiu tamen ne aperis ĝis en la sekvanta numero; (2) mi volis emfazi mian inecon kaj esprimi vidpunkton; kaj (3) per mia nomo “Hilary” oni povus supozi min viro – do, tutodirite, pseŭdonimo preferindis en tiu kazo.

Mi tamen decidis fari nomŝanĝon, prenante mian trian antaŭnomon, kaj mi dankas al Sally Phillips kaj d-ro Goodheir, ke ili vidigis al mi, ke tio necesas, se mi volas eviti konfuzon.

Karolino Gilmore

(antaŭe Hilary Gilmore)

Nia domo

En la *Esperanto News*, nov-dec, aperis artikolo pri nia domo, kiu povus supozigi al la legantoj, ke ĉio estas finita kaj decidita rilate al Esperanto-kursejo-kulturejo. Tute ne. Ni havas intertempan domon, kiun ni espereble plene utiligos dum ferioj (ne specife semajnfinoj, kiel estis skribite). Se evidentiĝos, ke tiu domo estas ĝuste tio, kion ni bezonos (post aldono de kromĉambroj), ni verŝajne havos la eblecon aĉeti ĝin por plentempa uzado, post deko da jaroj. Se ni trovas pli bonan domon post havigo de sufiĉe da mono, ni havos plenan liberecon aĉeti tiun domon.

Entute do, ni estas en tre bona situacio; jam havante ejon dum ni kolektadas sufiĉan monon por aĉeti nian propran domon (britan laŭ geografio kaj posedo, sed internacian laŭ uzado: vi pravas, Reto!).

Ne forgesu la domon do. Venu al Belper, kaj apogu la projekton.

Sally Phillips

Kiessago?

Foliumante tra “Elpafu la Sagon”, sur p.114 mi trovis “Peto de Ĉasisto”-n atribuitan al la “Buŝmanoj” de Bocvano. Jen surprizo! La vortoj estas tiuj de la tria strofo de “Jerusemo” de Wil-

liam Blake: "Alportu al mi pafarkon el fajra oro. . ."

Nu, ĉu la indiĝenoj lernis la poemon en sia loka lingvo de misiistoj, aŭ William Blake tradukis Bocvanan kanton, aŭ Tibor Sekelj mistifikas nin? Ĉu iu scias?

Henry D. Palmer

NOVAJ LIBROJ

La morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko,

de Jorge Amado. El la portugala tradukis

Geraldo Pádua. Revizio de Leopoldo H. Knoedt.

Ilustraĵoj de Floriano Teixeira. Fonto-Serio

n-ro 1. Chapecó, 1984. 111p.

Post tre kaj tro longa enutera periodo, jen naskiĝis la unua el la libretoj en Fonto-Serio. Bela kaj impona bebo! Ekde la alloga kovrilo, la klare legeblaj preslitteroj, la mirinde esprimivaj ilustraĵoj, ĝis la fortika bindado, kiu, kvankam broŝura, ne minacas disfali (kiel iuj aliaj) se oni volas malfermi la libron, la libro estas majstroverko de la eldona arto, kiu en librovendejo altiros ĉies atenton. Sed niaj librovendejoj estas malabundaj: vi do kredu min, ke vin plezurigos la fizikaj ecoj de la verko.

Kaj la enhavo? Ĉu ankaŭ ĝi plezurigos vin? Ho, jes. Nepre. Precipe se vi ŝatas elegantan kaj samtempe flue legeblan Esperanton. La traduko estas brila, kaj legiĝas kvazaŭ originala novelo en Esperanto (se nur ni havus similajn aŭtorojn!). Jorge Amado estas elstare populara brazila aŭtoro, kies reputacio disvastiĝis ankaŭ eksterlanden: liaj verkoj estas tradukitaj en 45 lingvojn kaj eldonitaj en 56 landoj. Ŝovinisme, mi emas pensi, ke neniu el la ceteraj 44 tradukoj superas la esperantan. . .

Jes, sed la enhavo? Estas tre malfacile resumi ĝin, ne perdigante ion al la legontoj. Kinkas Akvobleko estas la krom-

nomo de respektinda burĝo, kiu forlasis sian familion por vivi diboĉe-boheme inter la senradikaj laboristoj-krimuloj de la haveno. Ni vidas la efikon de lia morto en ambaŭ medioj. La familio "pro sia honoro" klopodas enterigi lin kun ĉiuj piaĵoj – tamen sen la ĝusta solidereco. La amikoj-diboĉuloj kunportas la kadavron dum lasta drinkfesto en la baroj kaj bordeloj kaj en la fino akcidente "dronigas" ĝin. Pro tio oni povas diri, ke Kinkas mortis dufoje.

Estas klare, ke Jorge Amado karakterize preferas la kolorplenan vivon de senzorguloj al la mucida, timplena, hipokrita vivo de la burĝoj. Kaj kiu, en sia koro, ne kunsentas (se ne konsentas) tiu ĵuĝon? Almenaŭ en la kadro de tiu ĉi libro ni salutas la geamikojn de Kinkas: "La gracia negrino Paŭla sin banis en larmoj ĉe sia pleto de tapiokaj kukoj. Ĉi-vespere Kinkas Akvobleko ne venos diri al ŝi poluritajn galantaĵojn, rigardi ŝiajn vastajn mamojn, proponi al ŝi maldecaĵojn, ridigi ŝin. . . Ĉe noktiĝo, kiam la lumoj ekbrilis en la urbo, kaj la homoj forlasis la laboron, la kvar plej intimaj amikoj de Kinkas Akvobleko – Kuriolo, Negro Logbuklo, Kaporalo Marteno kaj Facilpieda – malsupreniris Dekliven Tabuao survoje al la ĉambro de la mortinto. Verdire ili ankoraŭ ne estis ebriaĵ. Sendube ili estis prenintaj kelkajn glutajn, kortuŝite de la novaĵo, sed tiun ruĝon en la okuloj kaŭzis la verŝitaj larmoj, la senlima doloro, kion saman oni povas diri pri la malfacila voĉo kaj la ŝanceliĝaj paŝoj. . ."

Ho, esti tiel funebrata! Iasence la verko de Amado estas esploro de la moralaj valoroj kaj de la humanecaj kvalitoj. La fabelo de la simplaj homoj kaj la ruzaj singardemuloj (kun ties kompleta egoismo). Jes, fabelo. Kaj, kiel la plej bonaj fabeloj, ĝi enhavas ion eternan, ion validan en ĉiuj epokoj kaj ĉiuj latitudoj – kvankam, kompreneble, la latitudo de Bahía ŝajnas aparte taŭga por similaj okazaĵoj. Tial la manko de cinikismo, de kruelo, de amaro – en tiu ĉi bonhumora, gaja, humaneca rakonto,

kiun vi legos plurfoje kun neniam malplia plezuro, kaj al kiu mi konsilas turni vin eble en momentoj, kiam via vivo ŝajnas al vi superombrita de trogriza monotono.

Nu, legu ĝin almenaŭ unufoje.

W. Auld

Kiuj semas plorante, de Éva Tófalvi kaj Oldrich Knichal. Eldonis U.E.A., Rotterdam. 108 paĝoj. Prezo: £4.30 (inkl. de sendkosto.)

Ĉi tiu libro estas originale verkita en Esperanto kaj gajnis la premion "Raymond Schwartz" por romanoj en 1980. La enkondukaj vortoj priskribas ĝin kiel "psikologia, intima romano, kvazaŭ taglibro de la protagonisto". Mi konfesu tuj, ke de post la komenco de la legado mi ne povis lasi la libron, ĉar mi volis scii kio okazos sur la sekvonta paĝo, kaj sur la posta, k.t.p. La aŭtoroj verkas per hipnota stilo, agrabla por legi rapide kaj preskaŭ senhalte. Ili ne uzas superfluaĵn vortojn, kaj epizodoj ĉiam soifigas la scivolemon de la leganto por scii plu. Ne estas ĉapitroj kiuj invitas al paŭzo kaj lasi la libron "ĝis morgaŭ".

La protagonisto, iu Stefano Bende, troviĝas en psika sanatorio kaj rememoras la tagojn de sia vivo. Ni legas pri lia juneco kiel gimnaziano, kaj poste kiel studento en universitato. Tie li montras iom da intereso pri la programo de politika partio, je la komenco diskrete kaj poste aperte ĝis li estas enpuŝita en la rangojn de adeptoj. La partio petas ke li lernu Esperanton, ĉar diplomiginte en la angla kaj itala li ne havos malfacilaĵon lerni ĉi tiun "artefaritan" lingvon. La celo estas ke li enpenetru grupon de la nacia Esperanto-Ligo. Kiel kompenco por tiu tasko, li ricevas vilaon kun ĝardenisto, dommastrino kaj kuiristino. Lia ĉefo, la majoro, montras la vilaon al Stefano kaj je la foriro ŝlosas ĝin per sia propra ŝlosilo! Antaŭ jaroj, kiam mi iom aktiviĝis en politikaj rondoj, mi observis kaptadon de homoj por specialaj taskoj fare de iuj partioj, sed mi neniam vidis kompensojn tiel grandajn

por tiel negravaj taskoj, kiel la enpenetro de Esperanta rondo. Nek mi vidis manovron tiel nesubtilan kiel tiu de la majoro. La aludoj pri la hispana milito ne kongruas kun la datoj donitaj en la libro. La ribelo de la generaloj okazis nur du semajnojn antaŭ la kongreso de Vieno kaj tiam oni ankoraŭ ne antaŭvidis la longan batalon. Malgraŭ ĉi tiuj sulketoj, kiuj bremsetis mian legadon, mi agnoskas ke inter la malmultaj romanoj, kiuj de la komenco trafas la imagopovon de la leganto, troviĝas "Kiuj Semas Plorante . . ."

Amador Díaz

Etulaj aventuroj de Zora Heide. Författares Boksmaskin, Stokholmo, 1983. 103p. Prezo 12,60 gld.

"Etulaj Aventuroj" prezentas scenojn kaj rakontojn de vilaĝa vivo, precipe el infana vidpunkto. La temoj varias; Renkontiĝo kun ciganoj, Batalo de voloj inter infano kaj patro/instruisto, rememoroj pri fratineteto, kaj similaj pli/malpli konataj travivaĵoj. La lasta peco estas priskribo de la tuta komplika procedo de svatado kaj geedziĝo en la vilaĝo.

Interese estas, legante pri moroj kaj sintenoj en fremda medio, kompari la diferencojn kaj similecojn kun la propra kulturo. Ŝajnas al mi, ke la similecoj pli montriĝas ol la diferencoj, eĉ se ne unuavide . . .

Dafne Lister

Poemoj el du poŝoj. Specimeno por novtipa antologio. Kompilita de Reto Rossetti.

Jen bela 4-paĝa folio, kiu prezentas 34 poemetojn el la esperanta literaturo: 17 originaloj kaj 17 tradukoj. Ne imageblas pli trafa enkonduko al la plezuroj de la poezio, kaj ankaŭ la fakuloj plezure trovos en ĝi belegan bukedon, eventuale iujn forgesitajn aŭ eĉ neviditajn florojn.

Por ricevi ekzempleron, sufiĉos ĝin peti per rimajo (eĉ plej eta) al R. Rossetti, 2 Elmwood Crescent, Luton LU2 7HX.

ANONCETOJ

5p por ĉiu vorto. Minimume 20 vortoj.
Antaŭpagenda.

Sarlanda Esperanto-Ligo volas akiri jenajn britajn Esperanto-revuojn *Literaturo* 1919/20: 1-3, 5, 6; *Esperanto News* 1978:5, 1979:1; *Newsletter* 1974:3-4; *Esperanto en Skotlando* 1-6, 32-34, 38, 50-51, 81, 109. Ofertojn oni sendu al: SEL, Schulstr. 30, D-6601 SCHEIDT, FR Germanio.

HELPU DOKTORIĜI! Mi preparas disertaĉion "Interlingvistikaj konceptoj ekde 1945", bezonas ajnajn interlingvistikajn periodaĵojn, artikolojn, librojn, lingvoprojektojn kaj informilojn pri ili. Rekompenco laŭ interkonsento. Alexandro MELINKOV, a.j.a. 393, SU-344007 ROSTOV.DON, Soventunio.

Loughborough University has extended the teaching of Esperanto in its Summer Programme for 1985. In one week (21st-27th July) Don Lord and Stephen Thomson will be teaching a course in "Practical Esperanto" at intermediate and advanced level, and in the following week (28th July – 3rd August) a half-day course for beginners is available (taken in conjunction with one of a selection of other courses from the programme). Write for a brochure of The Summer University to The Centre of Extension Studies, University of Technology, Loughborough, Leics. LE11 3TU.

PRACTICAL ESPERANTO. 20 – 22 September 1985, Knuston Hall, Irchester, Wellingborough, Northants. Tutors: Don Lord, Alan Nutton, Stephen Thomson. This lively course is growing in popularity each year – book early! Further information from the Principal.

Free introductory course: All tutors of the Course should send names and addresses of all students to Anny Lawson, E.A.B. Membership Recruitment Campaign, 22 Fortismere Avenue, LONDON, N10 3BL.

Press Panel: Please send all cuttings on Esperanto or the language problem *immediately* to Kate Millard, 18 Stirling Road, Bristolington, BRISTOL, BS4 3PD.

Local Representatives: If you wish to become a Local Representative of EAB, please contact Muriel Shackleton, 3 Northdale Mount, Bradford, West Yorkshire, BD5 9AP.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) celas eduki homojn *per* Esperanto al racia pensado por faciligi rilatojn inter la laboristoj de la mondo. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, ROMFORD, Essex, RM6 6EB.

Volas korespondi

Magyar Miha 'lyne', TOKAJ, Jo'hai u.I.III/2, 3910 Hungario: 26-jara Hungara instruistino por biologio kaj geografio.

Miroslavo Stankovski, 58-260 BIELAVA, ul. Akacyova 4/7, Pollando kolektas poŝtmarkojn kaj korespondus kun juna samideano.

Sylvia Kowalowska, 90-336 Lodź, st. Promińskiego 7 m 24, Pollando: interesiĝas pri muziko, romanoj, arkitekturo.

Aniko Csaba, Hungario, Székesfehérvár-8000, Vörös Hadersreg út 55: 17-jara gimnaziano pri muziko, libroj, bestoj ktp.

Tadeusz Lisowski, Wybickiego 37 m 1, Torun 87-100, Pollando juna Polo interesiĝas pri vojaĝado kaj verkado de poeziaĵoj.

Dek-ok-jara lernantino, Danuta MACIEJCZAK, Ul. Rew. Pazda 19/34, 41-907 BYTOM, Pollando volas korespondi pri bona muziko, turismo, Britujo, ĝia lingvo kaj popolo.

Tridek-jara Jozsefni TOTH, Papp Magdolna, kaj 8-jara filino Judit TOTH, Bokouneg, Vörös Hadsereg u.6n, H-4164, Hungario volas korespondi kun Britoj. Kolektas p.m. kaj bildkartojn.

Juna instruisto de angla lingvo en Ĉinio volas havi korespondantojn en Britujo *en Esperanto*: Li ankaŭ iomete lernis la rusan kaj francan. Ssuming WANG Yueyang Fervoja Mezo-Lernejo, Yueyang, Hunan Provinco, Ĉinio.

Istvan Mady, Kele 26, H-8600 Siofok, Hungario 30-jara *lernanto*, volas korespondi kun Britoj.

